



# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 3 1967

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
CHEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
33-a (38-a) jaro  
Monata

## La 40-a Norvega Esperant-Kongreso KUNVOKO

Per ĉi tio ni kunvokas la 40an landan kongreson de Norvega Esperantista Ligo en Sauda Klubb, Sauda, la 3.—15. de Majo 1967. La unua laborkunsido komenciĝos la 14an de Majo je la 9.00.

Tagordo:


1. Malfermo per la prezidanto.
2. Elekto de kunvenaj funkciuloj (protokollantoj, kunvena prezidanto, elekta komisiono, komisiono pri plenrajtoj kaj voĉnombro).
3. Jarraportoj 1965 kaj 1966.
4. Jarkalkuloj 1965 kaj 1966.
5. Alvenintaj proponoj (statutŝanĝo (vidu sube), rezolucioj).
6. Kiel denove aktivigi la norvegan Esperanto-movadon kaj kreskigi la membro-nombrojn?
7. Elekto de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.
8. Eventualaĵoj.

Jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1966 troviĝas aliloke en ĉi tiu numero.

*Pri punktoj 3 kaj 4.* Ĉar landa kunveno ne okazis en 1966, la jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1965 ne estas traktitaj kaj aprobitaj de landa kunveno. La raportoj kaj kalkuloj pri 1965 kaj 1966 estas egale redaktitaj. La Estraro proponas legi nur tiujn pri 1966 dum la ĉi-jara kunveno, sed petas

la membrojn tralegi antaŭe tiujn pri 1965 en Norvega Esperantisto 4/1966, tiel ke oni povu ambau jarojn kune priirakti.

*Pri punkto 5. a)* La Liga Estraro proponas jenan statutŝanĝon: «§ 13, 1. avsnitt og første 2½ linje av 2. avsnitt utgår og erstattes med: «Ethvert møtende medlem har stemmerett på landsmøtet. Enhver Esperantoforening som er tilsluttet Forbundet, har så mange stemmer som den har medlemmer. Stemmetallet regnes på grunnlag av det antall medlemmer som det ble betalt for i foregående år, men baseres på innværende års medlemstall om dette er høyere. Foreningene har rett til å fordele stemmene for de ikke møtende medlemmer på medlemmer av foreningen som møter på landsmøtet. Hver forening sender minst 8 dager før landsmøtet Forbundsstyret fortegnelse over de medlemmer disse stemmer skal fordeles på; fordelingen foretas av landsmøtets fullmaktskomité. Stemmeberettigede som forlater møtet, kan ikke overdra sin(e) stemme(r) til andre. Et møtende medlem kan ved fullmakt avgi stemme også for medlemmer av en annen forening innen samme krets.» Avsnitt 3, 4 og 5 utgår.» — Motivigo: Ofte okazis ke membro, kiu ial ne estis elektita reprezentanto de sia klubo, miris ke li ne havas voĉdonrajton, kvankam li rajtas partopreni la landan kunvenon. Tio efikas precipe al la membroj de la aranĝanta klubo, se tiu klubo estas malgranda kaj laŭ la nuna



## El niaj kolegoj

«NEW ZEALAND ESPERANTIST» julio/aŭgusto 1966 skribas — anglalingve — interesan artikolon, el kiu ni tondas kaj tradukas: «SAVING FACE» THROUGH ESPERANTO.

Kiu vizitis Japanujon lastjare trovis, kiel oni ja antaŭdiris, ke paroli al japanaj geesperantistoj estas kiel paroli al novzelandaj geesperantistoj, escepte ke ne estis nura praktikado sed nia sola maniero interparoli kun ili. Unu granda diferenco estis, kiun

sistemo sekve havas nur malmultajn voĉojn; tio ne stimulas la partoprenon de la lokaj membroj. Ankorau pli malstimule efikis la nuna sistemo al la partopreno de la rektaj membroj. La celo de la propono estas stimuli la aktivigon kaj la partoprenon en la landa kongreso de laŭeble multaj klubaj kaj rektaj membroj.

b) Oni antaŭvidas proponojn pri unu aŭ pluraj rezolucioj.

Pri punkto 6. Dum la lastaj jaroj oni konstatis maltrankviligan malviglecon de la movado en nia lando. Okazis tre malmultaj kursoj, la nombro de novaj adeptoj malsuperas la normalan perdon, la membronombro malkreskas, kaj la membraro konsistas ĉefe el relative malmultaj malnovaj fideluloj. Tiu evoluo devas ne daŭri, ni devas iel haltigi ĝin kaj turni ĝin en revigligon kaj kreskadon, alie ni devos grave redukti nian agadon. La Liga Estraro deziras serioze diskuti tiun situacion kun la membroj kaj la klubaj reprezentantoj.

La Liga Estraro admonas ĉiujn klubojn sendi reprezentantojn al la landa kongreso, kaj esperas ke ankaŭ multaj rektaj membroj ĉeestos.

La Liga Estraro.

spertis tiuj, kiuj restis sufiĉe longe; se japana esperantisto ankaŭ scipovis la anglan, li neniam volis — kiom ajn multajn jarojn li studis la anglan, kaj kiom ajn malmultajn monatojn li studis Esperanton — paroli la anglan al ni.

Estis en tio pli ol nura lojaleco al la Esperanta ideo, kaj tio ne estas sole japana fenomeno; ĝi estas komuna al la plimulto de la oriento. La kaŭzo estas la sinteno ĝenerale konata kiel «gardi la vizagon».

Tio estas malantaŭ la supre menciita fenomeno. Vi ne scias, ĝis vi provis, kia estas la sento paroli fremdan lingvon al nacio kiu havas senkompare pli bonan komprenon de la subtilaj poentoj kaj aludoj ol vi iam povos havi. Al orientulo tiu pozicio estas eĉ pli granda psikologia malavantaĝo.

Sed inter esperantistoj tio ne ekzistas. Oriento aŭ okcidento, ni ĉiuj devis lerni, kaj por la ĉiutaga konversacio la diferenco inter veterano kaj komencanto malaperas post kelkmonata studo.

La esperantistoj de oriento kaj okcidento devus profiti el tio.

## Eŭropa Esperanto Kongreso 1967 - Innsbruck, Aŭstrio

S-ano Tibor SEKELJ festparolados!

Konstante, ke la celoj de EEK 1967 formas al tiuj de IOE, s-ano Tibor Sekelj, famkonata mondvojaĝinto, entuziasme interesas pri la projekto de EEK, precipe pro la fonda kunveno de INTERNACIA TURISMA SERVO ESPERANTISTA, kiel grava kontribuo al la jaro de la Internacia Turismo.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunvenos!

Eksciinte pri la okazigo de EEK 1967 en Innsbruck, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj decidis organizi la ĉiĵaran ĉefkunvenon en Innsbruck. Ĉiuj esperantistaj instruistoj estas invitataj partopreni la kongreson en Innsbruck. Informas la prezidantino de ILEI: F-ino J. Dedieu, Avenue Victor Segoffin 70, 31 TOULOUSE — 04, Francujo.

## Norvega Esperantisto

### ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien  
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por  
manuskriptoj: la 20-a en la monato  
antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-  
lando: n. kr. 8,00

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00  
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,  
1/8 p. kr. 19,00.

## Vetludoj

Ja treege popularaj estas la vetludoj, kiuj koncernas piedpilkajn rezultatojn, kaj kiuj povas doni al la gajnintoj konsiderindajn monsumojn.

Multe pli modestaj estas la vetludoj, kiujn oni povas aranĝi en klubaj kunvenoj — anstataŭ la ĉiamaj ellotadoj laŭ la antaŭdiluva metodo.

Oni eĉ povas eluzi la oficialajn vetludajn rubrikojn — se oni akiras tro multajn de la pasinta semajno — kaj oni pagas, kiel ordinare, kvaronan kronon por unu serio, kaj havas permeson partopreni per multaj serioj, laŭplaĉe, se oni nur pagas por ili.

Sed kial kaj kiel?

Unu klubano preparas serion da 12 demandoj, kaj por ĉiu el tiuj demandoj li prezentas tri respondojn, el kiuj la cetera klubanaro elektu la ĝustan. La demandojn li ja povas fari kiel eble plej malfacilaj. La premio, kiun ordinare gajnas partoprenantoj en ellotado, apartenas el tiuj, kiuj havas plej da poentoj. Tiel la ellotado havos iom pli da persona karaktero.

Malmultekostaj iranokteblecoj en Innsbruck nun haveblaj!

Al la Organiza Komitato sukcesis lastmomente atingi tre malmultekostajn tranokteblecojn: Unu lito po nokto kun la matenmanĝo nur aŭ ŝil. 60,00.

## SCIIGOJ DE N.E.L.

Taskotabelo por la kluboj. - Aprilo:

Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 1a jarkvarono (blankedo A 10) al N.E.L. kaj kopion al la distrikto. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasiso sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruigintaj kaj eventualaj novaj membroj.

La Estraro.

Kaj la mono? Klubaj kaso malsatas. Nia gazeto bezonas monon. Kial ne aranĝi vetludon kun la nobla celo helpi la ekonomion de nia gazeto?

### VOĈOJ EL LA KONGRESA LANDO

La Kongreso israela  
certe estos ege bela.

\* \* \*

En nia israela dom'  
salutas ni per vort' «ŝalom»  
(paco).

\* \* \*

Ravos vin la blu' ĉiela  
super tero israela.  
Ravos ankaŭ la klimat'  
Nenesesos ja kravat'.

\* \* \*

La Kongres' en Tel Aviv  
estos ĝu' por tuta viv'.

\* \* \*

Brilos la verda stelo  
dum Kongres' en Israelo.

### «ESPERANTO EN KOMERCO»

kvinlingva raportaro pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo g.m. 2,—; ekde 10 libroj g.m. 1,35. Esperanto-Rondo, 718, Crailsheim, Germanujo.

# NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

## Jarraporto 1966

### ESTRADO

La Liga Konsilantaro dum la tuta jaro konsistis el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz  
 Viceprezidanto: Kjell Gustavsen  
 Ĝenerala sekretario: Tom Arbo Høeg  
 Sekretario: Signe Haug  
 Kasisto: Karl Ekhaugen  
 Estraranoj: Olav Rygg, Jan Ekhaugen  
 Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Alfred Skyberg, Frank Aasheim

Ceteraj konsilantaranoj:

Johannes Flodmo, Mo i Rana  
 Fin Hole, Mandal  
 Trygve Kvalvåg, Stavanger  
 Ragnv. Rian, Trondhejmo  
 Johan H. Rosbach, Sarpsborg.

Revizoroj: John Selbekk, Karin Sandberg.

Antaŭ la somero la ĝenerala sekretario subite informis ke li ne plu povas funkcii. John Berggreen deklaris sin preta asisti en la oficejo kiel helpsekretario.

Landa kunveno ne okazis dum 1966.

### ADMINISTRADO

Estrarkunvenoj. Okazis 6 estrarkunvenoj (5 en 1965) kaj oni protokolis 72 punktojn (62 en 1965).

Kunveno de la Liga Konsilantaro. Oni vane klopodis aranĝi kunvenon de la Liga Konsilantaro en Junio.

Cirkuleroj. La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 6 cirkulerojn, i. a. kun la subskribfolio por U.N.O. kaj kun invito al mendoj de donac- kaj propagand-abonoj al Norvega Esperantisto. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. Tial nur 2 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

Oficejo. La nova oficejo altgrade pli-

faciligis la laboron de la estraranoj, kiuj povas nun multe pli efike plenumi siajn taskojn; sed la tenado de la oficejo estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de la membroj per la oficeja fondaĵo. Pluraj pagas libervolan monatan aŭ jaran kontribuon. La oficejo servas samtempe por la Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas partojn de la luprezo. La malnovan oficejon oni konservas kiel provizejon. La oficejon estris la prezidanto. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

La Oficeja Fondaĵo dum la jaro donace ricevis kr. 1 511,10 (en 1965 kr. 1 463,25 + specialan donacon kr. 600,50 = kr. 2 063,75). La Estraro kore dankas al la kontribuantoj.

La Financa Komisiono, konsistanta el John Berggreen (prez.), Kirsten Ek, Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj), daŭrigis sian laboron. Oni daŭre dissendis petskribojn kaj publikigis artikolojn en Norvega Esperantisto. Neta gajno: kr. 1 089,68. Je la jarfino la Komisiono povis denove transdoni al la Propaganda Fondaĵo donacon de kr. 1 000,00. La laboroj estas daŭrigataj.

Kunlaboro kun N.E.F.A. Laŭ peto de Norvega Esperanta Fervojista Asocio oni sendis kondiĉojn por disponigi al ĝi paĝon en Norvega Esperantisto kaj atendas la decidon de N.E.F.A.

### DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

Distriktoj. Neniu nova distrikta organizaĵo fondiĝis. Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris. Orienta, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. — Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

Kluboj. Je la jarfino 1965 N.E.L. havis 22 aliĝintajn klubojn. Neniu nova klubo fondiĝis, kaj neniu klubo malfondiĝis. Je la jarfino 1966 N.E.L. sekve havis 22 klubojn. «La Ponto», Horten, decidis ekŝigi je la jarfino.

### Membrostatistiko:

Bergen, La Esperantoklubo de, Ok.D.	27
Bodø Esperantoklubb, N.D.	11
Gjøvik, Klubo Esperantista de, Or.D.	5
Halden, Ascendo, Or.D.	12
Hamar, La Norda Stelo, Or.D.	16
Harstad, Noktomezo Suno, N.N.E.D.	9
Haugesund, Mara Vento, Ok.D.	46
Horten, La Ponto, Or.D.	12
Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok.D.	6
Kristiansands Esperantoklubb	15
Løten, La tri verdaj steloj de, Or.D.	7
Mandal, Esperantoklubo en	9
Mo, La Esperantoklubo de, N.D.	5
Odda, La Glaciario, Ok.D.	5
Oslo, Klubo Esperantista en, Or.D.	138
Sarpsborg, La Urso, Or.D.	16
Sauda Esperantoklubb, Ok.D.	19
Skorovatn, Skorovas	
Esperantoklubb, M.D.	6
Skudeneshavn, La Granda Ideo, Ok.D.	9
Stavanger Esperantoklubb, Ok.D.	5
Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D.	6
Trondhejmo, Grupo Esperantista, M.D.	35
Sumo:	419

Rekte aliĝintaj membroj	119
Subtenantaj membroj	2
Dumvivaj membroj	9
Honoraj membroj	1
Entute:	551

Krome pagis 3 kontribuaj membroj.

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas. 1 honora kaj 2 dumvivaj membroj estas samtempe klubanoj (po 1 en Oslo, Skudeneshavn kaj Trondhejmo), krome 1 klubano en Oslo estas ankaŭ subtenanta membro. Specifo de la membraro laŭ kategorioj: klubanoj 339 ordinaraj, 11 junulaj, 58 familiaj, 11 junaj familiaj; rektaj membroj 10 ordinaraj, 2 familiaj, 13 junulaj. Entute la membronombro montras perdon de 1,6 % kompare kun la antaŭa jaro.

### KLUBLABORO

Superrigardo. (Ĉar nur 15 el la 22 kluboj ensendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj certe estas tro malaltaj). Suma membronombro je la 1/1 1966: 430. Aliĝoj: 39, ekŝigoj: 50. Membronombro je la 31/12: 419. — Okazis 142 klubkunvenoj,

meznombre ĉeestis proks. 57 %; estas raportita 100-procenta ĉeesto. — Raportiĝis 37 estrarkunvenoj, 12 festoj, ekskursoj k.t.p. En 5 kluboj laboris 8 studrondoj kun 48 membroj. 6 kluboj raportas pri biblioteko kun 197 volumoj. 66 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 45 superan, 2 instruistan.

La kluboj kontentige raportas dum 1966, sed la Estraro ankaŭ zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

Teatra Sekcio, gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

### STUDLABORO

Kursgvidantoj. Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1966, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

Kursoj. Raportiĝis 7 kursoj por komentantoj kun sume 43 kursanoj en Bergen, Oslo kaj Sauda, kaj 3 kursoj por progresantoj kun 24 kursanoj en Haugesund kaj Oslo. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

Korespondaj kursoj. La Sekcio pri Korespondaj Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 17 kursanoj, al la dua parto 4. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj; 1 lernanto en la unua parto kaj 1 en la dua parto estas tiaj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 62 kursanoj, al la dua parto neniu. — Neniu el la kursanoj estas varbitaj de membroj de N.E.L. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten kaj L. K. Hunnes, por la junuloj L. Anjer, por «Folkets Brevskole» Ragnv. Rian, por blinduloj H. Karterud. — La kurso estis 4-foje anoncata en la semajna gazeto «Hjemmet» dum la aŭtuno.

*Gazeta kurso* aperadis en 1966 en Hamar Arbeiderblad.

*Perfektiĝa studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1966 korektadis taskojn por interesigantoj. Vendiĝis kelkaj kajeroj de ekzerctaskaroj. Oni aparte klopodos igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj.* Ordinara ekzameno okazis en Junio en Oslo. 4 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon, 1 la superan. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal (membroj). Ekzistas 6 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Hauge-sund, Sauda, Tromsø, Trondhejmo, Østfold, kaj 7 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

#### INFORMADO

*Informa Fako* (Komisiito pri informado: Ludvig Anjer). La komisiito diversmaniere klopodis instigi al kolektado de subskriboj al la propono al U.N.O. kaj klopodis organizi verkadon de gazetartikoloj okaze de la transdono de la propono al U.N.O. Plue li instigadis pri aliĝo al la Kongreso de N.E.L. en Sauda kaj al la 52a Universala Kongreso en Tel Aviv.

*La Propaganda Fondajo* ricevis donacojn de entute kr. 1 392,50 kaj la Financa Komisiono transdonis al ĝi kr. 1 000,00. Bankintereso estis kr. 218,16. La fondaĵo posedis je la jarfino kr. 9 291,73. El la fondaĵo estas asignitaj por la prelegvojaĝoj de Sakaeda kaj Aŝvinikumar' kr. 486,75. La reala kapitalo sekve estas kr. 8 804,98.

*«Esperanto-nytt».* Ĉar la komisiito pri informado pro eksterordinara profesia okupiteco ne havis okazon fari decidajn paŝojn por ĝia reapero, tiu informbulteno ankaŭ dum 1966 ne aperis.

*Informbroŝuroj.* Oni daŭre uzadis «Esperanto-nytt» n.ro 3/1961 (kaj parte ankaŭ aliajn numerojn) kiel ordinaran broŝuron. Oni decidis prestiĝi novan eldonon de n.ro 3/1961. Oni ricevis proks. 900 ekzemplerojn de la «malgranda flava» broŝuro. — La faldfolio «Velkommen til Esperantobevegelsen» estis disdonata al ĉiuj kursanoj por montri al ili la avantaĝojn de membreco.

*Gazetara Servo,* gvidata de Ludvig Anjer, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 12 bultenojn kun sume 33 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj; la plimulto el la bultenoj aperis en ambaŭ ofi-

cialaj lingvoformoj. Oni daŭre abonis eltondadojn per la firmao «Argus». Arhivigov konscience prizorgas Ruth Herlofson. Oni registris 279 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 201 novaĵojn kaj artikolojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 480 aperigojn (443 en 1965) en 103 gazetoj kaj revuoj (106 en 1965). Atakoj al Esperanto ne okazis. Pluraj kluboj aperigis raportojn pri siaj jarkunveno kaj aliaj okazaĵoj en lokaj gazetoj. La 50-jara jubileo de Klubo Esperantista en Oslo donis bonan eĥon en la loka gazetaro. Pluraj kluboj povas montri al sukcesaj klopodoj rilate al la gazetaro en 1966, inter ili Sauda Esperantoklubb tenas la unuan lokon.

*Radio* (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). La 27an de Januaro okazis 15-minuta norveglingva intervjuo kun J. Berggreen per Lillian Sonning pri Esperanto, ĝia literaturo kaj movado, kun recito de poemo de Wildenvey en Esperanto kaj norvega lingvo. La intervjuo (en iomete reviziita formo) estis ripetata la 28an de Novembro. — Klopodo aperigi Sakaeda en «Dagsrevyen» estis vana.

*Interŝtataj organizaĵoj* (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). La komisiito ne raportis antaŭ la finredakto de ĉi tiu jarraporto, sed ni scias ke li ankaŭ en 1966 grave kunlaboris kun Ernfrid Malmgren pri la «Parlamentara Kampanjo». Plie li denove kolektis proponantojn de U.E.A. por la Nobel-premio 1967, kaj subskribojn de i. a. la Laborista Landa Sindikato («L.O.»), 11 pliaj parlamentanoj kaj 7 ministroj kaj eksministroj al la propono al U.N.O.

*Blinduloj.* La komisiito, Otto Prytz, informas ke «Norges Blindforbund» restarigis la Esperanto-konsilantaron kun jenaj membroj: Trygve Tangen (prez.), Hilda Sunde, Otto Prytz. Li laboris pri planoj pri surbendigo de Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo kaj de Norvega Esperantisto.

*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, Folldal, klopodis por aperigo de Esperanto-kurso en «Speideren».

*Junularo.* Ankaŭ dum 1966 ne funkciis komisiito.

*Faksekcio por Instruistoj* estis gvidata de Astrid Mansrud. Ŝi kunlaboris kun Ernfrid Malmgren pri statistiko pri tempo utiligata por instruado pri fremdaj lingvoj en lernejoj, okaze de la «Parlamentara Kampanjo».

*Esperanto en la lernejoj* (prez. de la Komisiono por Lerneja Kampanjo: C. Støp-

Bowitz). Al la Komisiono aliĝis Frank Aasheim kaj Tom Arbo Høeg, kaj oni intencas nun serĉi kontakton kun la konsilantaro pri eksperimenta instruado. Daŭre venis neniu eĥo al la rezolucio sendita de la landa kunveno 1963 al ĉiuj norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj kun rekomendo klopodi pri akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj.

*Informaj prelegoj.* Raportigis 5 informaj prelegoj en Bardu, Bergen, Bodø kaj Folldal, kun sume proks. 120 aŭskultinoj.

*Nordlanda Esperanto-Komitato* (reprezentanto de N.E.L.: C. Støp-Bowitz). La komitato daŭre ne montris aktivecon.

*«Landslaget Moderne Språk».* Laŭ invito de tiu organizaĵo oni aranĝis, kunlabore kun Eldonejo Esperanto, ekspoziceton de Esperantolerniloj dum ĝia landa kunveno en la Universitato en Oslo en Aŭgusto.

#### DIVERSAĴOJ

*Norvega Esperantisto.* Aperis 4 ordinaraj n.roj 16-paĝaj kaj 2 8-paĝaj kaj 2 duoblaj n.roj 16-paĝaj, sume 112 paĝoj. La enspezoj per kotizoj kaj anoncoj ne permesis eldonon de 10 plenaj 16-paĝaj numeroj. La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg (ĉefredaktoro), kaj Hans Amund Rosbach, Folldal. La ekspedadon tre akurate prizorgis Tharald Dybing, kiu aranĝas ankaŭ pri la adres-stenciloj. La abonkotizo estis kr. 8,00. — La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj kiel en 1965. — Haaves Boktrykkeri, Brumunddal, kiu dum multaj jaroj presis la gazeton, informis ke ekde 1967 ĝi ne plu povas prizorgi la presadon. Oni ekhavis interkonsenton kun Østlendingens Trykkeri, Elverum, pri presado.

*«Pro Merito».* Ordena promocio ne okazis dum 1966.

*Biblioteko.* La prunedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., la ceteraj estas sekure magazinitaj. La kresko de la biblioteko ĉefe rezultis el recenz-ekempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi. Prunedoniĝis 7 libroj.

*Turistbroŝuro pri Oslo.* La Turistrafika Asocio de Oslo denove pretigis turistbroŝuron pri la ĉefurbo en Esperanto, ĉi-foje en 40 000 ekzempleroj.

*Filmo «Bonvenon al Oslo».* Pluraj kopioj de la filmo daŭre cirkuladas en la mondo.

*Turisma Servo de N.E.L.,* sub gvidado de

Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Budapeŝt kaj aranĝis karavaneton. Aŭtune la Turisma Servo dissendis informojn pri la 52a Universala Kongreso en Tel Aviv.

*Internacia organizaĵo.* La kunlaboro kun U.E.A. estis bona. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A de N.E.L. estas Ludvig Anjer. C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. Anjer partoprenis la Komitatkunsidojn dum la kongreso en Budapeŝt. En 1966 estis 64 Delegitoj en 26 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 117. En la konkurso de U.E.A. Norvegujo nun estas lokigita en la dua grupo, (lando kun malforta movado), kie ni atingis la 8an lokon kun 81,48 %.

*Nobel-premio de paco al U.E.A.* La propono pri U.E.A. kiel kandidato estas ripetita por 1967.

*Jaro de Internacia Kunlaborado.* La kolektado de subskriboj al la peticio pri Esperanto al U.N.O. grandparte karakterizis nian agadon ankaŭ dum 1966. Oni vaste dissendis subskriblanketojn al kluboj, membroj kaj aliaj, kaj per Norvega Esperantisto kaj per cirkuleroj regule admonis la esperantistojn koncentriĝi pri tiu grava tasko. Rezultis ĝis la unua limdato, la 31an de Julio 1966: 5 841 unuopaj subskriboj, inter ili multaj eminentuloj, kaj 39 organizaĵoj kun sume 635 994 membroj. La agado estas daŭrigata, sed donis tre malmultajn subskribojn post la oficiala transdono al U.N.O. la 6an de Oktobro 1966.

*51a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Budapeŝt. Aliĝis 28 norvegoj, sed ne ĉiuj ĉeestis. La Norvegan Registaron reprezentis Johan Matland, N.E.L.n reprezentis Kjell Gustavsen.

*Prelegvojaĝoj.* Printempe oni aranĝis prelegvojaĝon por la japano Hidejuki Sakaeda al Okcidenta Norvegujo, aŭtune por Sakaeda al Norda Norvegujo kaj por la hindo Aŝvinikumar' al Okcidenta Norvegujo.

*Jubileo en Oslo.* Klubo Esperantista en Oslo festis en Novembro sian 50- (60-)jaran jubileon kaj sukcesis profiti tiun okazaĵon por vasta atentigo pri Esperanto per la gazeto kaj eĉ per la radio.

*Helpagado.* Oni daŭrigas la kunlaboron kun Mocambiko kaj kun Esperantista Asocio de Madagaskaro.

*«Vivo de Zamenhof».* Oni akceptis proponon de Dreyers Forlag pri transpreno de



680 ekzempleroj de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» por kr. 1 360,00, kaj disvendata la libron por kr. 3,00, sed la disvendado ne okazas kontentlige vigle.

«Norsk Kulturråd». Oni informis al «Norsk Kulturråd» pri nia laboro, petante favoran konsideron de eventualaj petskriboj pri subvencioj.

*Kartoteko pri norvegaj esperantistoj.* La kartoteko enhavas nun 9166 kartojn pri esperantistoj en 705 lokoj. Kartoj pri kursanoj de la lastaj jaroj estas skribitaj, sed ankoraŭ ne envicigitaj.

*Koresponda statistiko.* N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1 337 leterojn kaj 1 038 presajojn kaj sendis 1 414 leterojn kaj 3490 presajojn.

*La intereso pri Esperanto* ŝajne malkreskis, se oni juĝu laŭ la nombro da demandoj pri Esperanto, kiujn ricevis la oficejo de N.E.L. Ja ne okazis kongresoj aŭ similaj aranĝoj en Norvegujo dum 1966, kaj nur ĉirkaŭ la sola iom elstara okazaĵo, la jubileo en Oslo, ni povis konstati pli viglan alfluan de deman-

doj. Evidente ekzistas en la popolo favora sinteno kaj latentaj intereso, sed necesas aktiviĝi ĝin. Per la malapero de Esperanto-nytt ni perdis nian eble plej bonan aktivigilon. Nia «sistema varbado» estas regule aplikata al ĉiuj interesigantoj. La gazetaro kontentige publikigadis pri Esperanto.

*Konkludo.* 1966 denove montras malkreskon de la membronombro, sed feliĉe nur malgrandan. Montrante al la konkludo de la pasintjara raporto ni povas nur substreki la urĝan neceson renovigi la membraron, antaŭ ĉio per junaj fortoj. Konsiderante la laborplanon de N.E.L. ĉiu klubo kaj ĉiu membro devas streĉi ĉiujn fortojn por denove kreskigi la membronombro.

Oslo, la 31an de Decembro 1966  
la 23an de Februaro 1967

*C. Stop-Bowitz*                      *Kjell Gustavsen*  
*Signe Haug*                         *Karl Ekhaugen*  
*Olav Rygg*                          *Jan Ekhaugen*  
   *John Berggreen.*

## Internaciaj Feriaj Kursoj Helsingør, Danlando 23. — 30. Julio 1967

*Helsingør* estas urbo tre konata el la dramo «Hamleto». Ĝi havas proks. 30 000 loĝantojn kaj situas iom norde de Kopenhago (I horon per trajno). Ekster Helsingør estas bel-ega banstrando. Trans la maro klare vidiĝas sveda urbo Hälisingborg, atingebla per ŝipo dum 20 min.

La hejmo de niaj kursoj estas *La internacia Alternejo*, kiun ĉirkaŭas granda parko, kie la kursanoj ĝuas multajn promenojn. Ĉiuj partoprenantoj loĝos kaj manĝos en la alternejo. Tiel ni anoj de multaj landoj estos granda rondo familia, kie estos parolata nur Esperanto. Granda parto de la internacia Alternejo estas rekonstruita, do nova kaj moderna, preskaŭ luksa. La adreso de la alternejo estas: Den internationale Højskole, Kongevej 72, Helsingør, Danlando.

Nur antaŭtagmeze okazos la instruado, en jenaj kursoj:

- 1) *Konversacia* kurso por tiuj, kiuj deziras parolekzercon. Ĝin gvidos lerte, parolige kaj ridige f-ino Riisberg, Kopenhago.
- 2) *Perfektiga kurso* por tiuj, kiuj deziras gramatike kaj stile perfektigi. Ĝin gvidos s-ro Moravec, Flensburg, Germanujo.
- 3) *Elementa kurso* por tiuj, kiuj scias neniom aŭ nur malmulte pri Esp. Ĝin gvi-

dos s-ro Sögård-Hansen, Aarhus, laŭ Friis-metodo, nova rekta metodo, per kiu ĉiu lernas nian lingvon tiel nature, kiel niaj infanoj lernas la gepatran lingvon.

4) *Prepara kurso* por Friis-metodaj geinstruistoj. S-ro Sögård-Hansen gvidos ankaŭ ĝin. Per la elementa kurso la novaj geinstruistoj havos eblecon sperti, kiel facile lernas lernantoj, eĉ se ili venas el diversaj landoj.

Ankaŭ *Feriaj gastoj*, ne dezirante partopreni iun kurson, rajtos ĉeesti la semajnon.

Posttagmeze ni aranĝos komunajn ekskursojn al diversaj vidindaj lokoj, ekz. al Kronborg (kastelo de Hamleto), Hillerød, sveda urbo Hälisingborg. — Vespere ni aranĝos prelegojn, ian gajan programon, eble dancadon, kantadon, prezentadon de filmo ktp.

Nia malferma kunveno okazos la 23/7 je la 20'a h. Oni alvenu posttagmeze en tiu tago. Pro foriro de alia grupo neniu rajtos veni pli frue ol post la 13'a h. — La 30/7 ni foriros antaŭtagmeze.

En la semajno post nia kursaranĝo estos SAT-kongreso en proksima urbo Malmö.

*L. Friis,*  
Ingemannsvej 9,  
Aabyhøj, Danlando.

## La kalkuloj de Norvega Esperantista Ligo

SPEZOJ 1966

<i>Enspezoj:</i>	
Klubkotizoj .....	5 779,00
Rektaj membroj .....	2 373,40
Rentumoj .....	327,14
Gazeta kurso .....	100,00
<i>Elspezoj:</i>	
Kostoj .....	1 802,10
Norvega Esperantisto .....	4 169,38
Gazetara Servo .....	681,80
Afranko .....	796,25
Kotizoj al U.E.A. ....	445,00
Kotizoj al la Distriktoj .....	188,00
Al la kapitalo: gajno .....	497,01
	8 579,54
	8 579,54

BILANCO JE 31/12 1966

<i>Aktivaĵoj:</i>	
En la kaso .....	680,22
Poŝtĝirokonto 100.30 .....	1 265,62
Meblaro .....	502,88
+ amortizo .....	50,00
«Pro Merito» .....	440,59
243 akcioj en Esperantoforlaget A/S .....	5 346,00
<i>Debitoroj:</i>	
Oslo Sparebank .....	9 291,73
Andresens Bank .....	12 423,80
Div. debitoroj .....	1 473,48
	23 189,01
<i>Pasivaĵoj:</i>	
Div. kreditoroj .....	3 636,13
La kontorfondaĵo .....	4 257,48
«Esperanto-nytt» .....	1 877,51
La Propaganda Fondaĵo .....	6 681,07
+ donacoj 1966 .....	2 392,50
+ rentumoj .....	218,16
	9 291,73
Garantifondaĵo dumvivaj membroj .....	617,00
Jubilea kaso 1961 .....	172,50
Loterio .....	3 082,65
Konservataj klubkaso	325,02
Kapitalo .....	7 617,29
+ gajno .....	497,01
	8 114,30
	31 374,32
	31 374,32

Oslo, la 31an de Decembro 1966  
la 23an de Februaro 1967

*John Selbekk*  
revizoro.

*Karl Ekhaugen*  
kasisto.

## La Korespondaj Kursoj

(Avdeling for Brevundervisning)  
SPEZOJ 1966

<i>Enspezoj:</i>		
Kurskotizoj .....		388,25
Rentumoj .....		172,80
<i>Elspezoj:</i>		
Studmaterialoj uzitaj .....	200,00	
Kostoj .....	168,50	
Afranko .....	48,40	
Al la kapitalo .....	144,15	
	561,05	561,05

### BILANCO JE 31/12 1966

<i>Aktivaĵoj:</i>			
En la kaso .....	40,44		
Postgirokonto 100.33 .....	485,18		
En la Poŝta Ŝparkaso .....	2 217,00		
Forretningsbanken/Den N. Creditbank .....	3 483,57		
Studmaterialo .....	4 090,00		
<i>Pasivaĵoj:</i>			
Kapitalkonto			
Saldo je 1/1 1966 .....	10 172,04		
Al la kapitalo .....	144,15		10 316,19
	10 316,19		10 316,19

Taps- og vinningskonto er satt opp etter kassa-dagbok med bilag, som er revidert. Postgirokonto og bankbøker stemmer med ovenstående tall i status. Studiemateriell er beregnet ut fra forrige års beholdning med fradrag av forbruket i året. Jeg går ut fra at styret holder seg å jour med denne beholdnings reelle verdi.

*Else-Margrethe Müller*  
kasistino.

*Erling Anker Haugen*  
revizoro.

## UNESKO- novaĵoj

### INTERNACIA KOLEKTO DE AFRIKA MUZIKO

Jus aperis katalogo de «The Sound of Africa» (Sonoj de Afriko), serio da longedaŭraj diskoj. Ĝi listigas 210 diskojn kun 3 000 eroj da aŭtentika afrika muziko en 128 afrikaj lingvoj, kolektitaj de la registra fako de la Internacia Kolekto de Afrika Muziko, en Roodepoort apud Johannesburg. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

### INTERNACIA INSTRUCENTRO KREOTA EN ISRAELA KIBUCO

ISMUN (Internacia Studenta Movado por Unuiĝintaj Nacioj) decidis en sia 17a ĝenerala konferenco, okazinta antaŭ nelonge en Israelo, starigi en kibuco apud Jerusalemo instrucentron, kie studentoj el evoluantaj landoj povos sekvi kursojn kaj lerni pri la celoj kaj atingoj de Unuiĝintaj Nacioj. Eestis lokoj por 50 studentoj, kaj inter la kursoj troviĝos filozofio, politika scienco, ekonomio, sociologio kaj sanitara scienco. La centro celos sentigi al gejunuloj, ke ili efektive partoprenas la atingojn de Unuiĝintaj Nacioj. (Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)



## FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA  
FERVOJISTA ASOCIO — NEFA  
Redaktoro: Odd Kolbrek, Kallbakkstubben 22,  
Oslo 9

## Ni prezentas nin

Kiel la norvega esperantistaro sendube scias, ekzistas en nia lando esperantista fervojista fakmovado, kies nomo estas Norvega Esperantista Fervojista Asocio — NEFA, kaj tiu asocio fondiĝis la 4an de novembro 1949.

Nuntempe ĝia membraro konsistas el proksimume 60 membroj.

Tiuj kiuj havas la jarlibron de UEA, trovas tie ke inter la diversaj esperantistaj fakorganizajoj, ankaŭ estas fervojista:

Internacia Fervojista Esperanto Federacio — IFEF, fondita en 1948. Al tiu organizaĵo NEFA estas aliĝita.

IFEF nuntempe havas 2 422 membrojn en 19 landoj, kaj de 1966, ĝi estas aliĝinta faka asocio de UEA.

Dum la 15a kongreso de IFEF en majo 1963, en la brita urbo Stoke-on-Trent, pro-

fesoro Ivo Lapenna, en sia festparolado, karakterizis IFEF kiel unu el la veraj sojloj de la tutmonda Esperantomovado. La celoj de IFEF estas:


«Disvastigi la uzadon de Esperanto inter fervojistoj, ĉe fervojistaj organizaĵoj kaj fervojaj instancoj.

Interkonatigi aktivajn kaj emeritajn fervojistojn, scipovantajn aŭ lernantajn Esperanton.

Arangi internaciajn renkontiĝojn. Eldoni oficialan fakan organon kaj fakterminaron. Kontribui al la ĝenerala kulturo de la membroj.»

Tiuj celoj de IFEF, kompreneble ankaŭ devas esti la plej gravaj por NEFA, kaj jen ni volas resumi kiamaniere ni agadis, kaj ĉiam agadas por plenumi nian taskon.

Por disvastigi la uzadon de Esperanto inter



La estraro de NEFA, elektita dum la jarkunveno en Lillestrøm la 19an de februaro. De maldekstre: Kjell Karlsen, kasisto, Odd Kolbrek, sekretario kaj redaktoro, Per Johan Krogstie, prezidanto kaj komitatano de IFEF, Øivind Lund, estrarano, Johan A. Kleven, revizoro, malantaŭ Kleven: Erling A. Rygge, supleanto, Brynjulf Andresen, revizoro. La jenaj ne ĉeestas: John Moe, vicprezidanto, Gunnar Flenvang, estrarano.

fervojistoj ĉe fervojistaj organizaĵoj kaj fervojaj instancoj, ni helpe de Norvegaj Ŝtataj Fervojoj — NSB, kaj Norvega Fervojista Sindikato — NJF, povis presi kaj disvastigi okulfrapanajn propagandafiŝojn kaj tre taŭgan 24-paĝan informbroŝuron kun la nomo: «Si ikke at det er overflødig, også du kan bruke Esperanto- verdensspråket.» Ni ankaŭ havas pretan programon kaj planon por semajnfina informkunveno por neesperantistaj kolegoj kun familianoj, kiuj volas ekscii ion pli pri Esperanto kaj pri la Esperanto-movado, ol ke ili nur laŭ ondiro scias.

Pro la tre amikaj rilatoj en kiuj ni estas kun la fervojo kaj kun la fervojista sindikato, ni estas dankemaj kaj kontentaj, kaj multflanke ni spertis ke oni en tiuj instancoj plene respektas nian laboron kaj eĉ en iu grado uzas Esperanton.

Menciinde estas ke NSB ĉiujare tutpaĝe anoncas en la jarlibro de UEA, kaj de tempo al tempo ĝi eldonas informbroŝurojn por turistoj en la internacia lingvo.

NEFA ankaŭ faris ĉion eblan por kontribui al la celo aranĝi internaciajn renkontiĝojn, en 1965 ĝi aranĝis en Hamar la 17an kongreson de IFEF, kie partoprenis 430 personoj el 18 landoj.

La nuna granda tasko de NEFA estas eldonado de fervoja fakterminaro Esperanto-Norvega kaj Norvega-Esperanto.

Ordigita laŭ modelo de la ĵus eldonita ĉe la germana sekcio de IFEF ĝi enhavas proksimume 2 000 terminojn.

Cetere ni flanke de tio ankaŭ partoprenas en pli ampleksa traduklaboro al Esperanto de ĉiuj 11 000 diversaj fakterminoj en la granda leksikono de UIC (UIC : Union Internationale Des Chemins De Fer—Internacia Unuiĝo de Fervojoj).

Nun la lingvoj de la UIC-leksikono estas la jenaj: franca, germana, angla, itala, nederlanda kaj hispana, — kaj ni esperas, ke estonte ankaŭ Esperanto enkondukiĝos en tiun vortaron.

Ĝis nun mankis al NEFA propra gazeto.

Kvankam ni 6 fojojn jare ricevas la gazeton de IFEF: La Internacia Fervojisto, kaj ni ĝojas ke la sindikata gazeto norveglingve tre bone referas interesajn por ni, ni ofte revis pri kaj diskutis kiamaniere ni eldonu propran NEFA-gazeton.

Estas klare ke pro malgranda asocio kiel NEFA, estas nepripensinda afero sole ordigi tion.

Tial ni serĉis kontakton kun NEL, pro-

ponante ke ni povu eldoni nian FERVOJISTAN PAĜON en la organo de NEL, kaj la respondo estis pozitiva. Dum la jar-kunveno de NEFA en Lillestrøm, la 19an de februaro ĉijare, la decido fariĝis, kaj elektigis kiel redaktoro la sekretario de NEFA s-ro Odd Kolbrek.

Nia intenco estas, ke ni per tiuj paĝoj volas informi niajn anojn pri gravaj NEFA-novaĵoj, tiom lokalaj en la karaktero, ke la organo de IFEF ne aperigos ilin.

Cetere ni deziras priskribi popularajn informojn pri fervojoj, en-kaj eksterlande, pri turismo kaj vojaĝoj, kaj ni esperas ke tio plaĉos al la cetera legantaro de NORVEGA ESPERANTISTO.

Simile ni esperas ke ni fervojistaj legantoj de NORVEGA ESPERANTISTO ankaŭ povas esti riĉigitaj per la cetera enhavo de la gazeto.

Tial mi en la nomo de NEFA deziras, ke la kunlaboro kun NEL estu fruktedona por ambaŭ partoj.

Per Johan Krogsiie.

## RECENZOJ

### Lapenna Paroladas

Ivo Lapenna: Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Suplemento al «Retoriko». Eldono de la aŭtoro. Rotterdam 1966. 152 paĝoj, broŝ. Prezo: 11 guldenoj.

Tiuj multaj, kiuj legis, studis, ĝojis pri la konata «Retoriko» de Lapenna, la teoria lernolibro pri parolarto, ne povis ne senti la mankon de la praktika parto. Jen ĝi aperis, kaj la aŭtoro mem nomas ĝin Suplemento al «Retoriko».

Tiuj multaj, kiuj aŭdis profesoron Lapenna paroladi aŭ prelegi, devis vole aŭ nevole admiri lin pro lia escepta talento, kaj konfirme konfesi, ke Lapenna konas ne nur la teorian parton de la parolarto — kiun oni ja povas ellerni per diligentaj studoj — sed ke li ankaŭ scias praktike apliki la severajn regulojn, kiujn li donas, ne nur koncerne parolfigurojn kaj stilon, sed ankaŭ pri la uzado de la voĉo kaj mangestoj, pri la tuta ekstera apero.

Ni nun ĝojas, ke Lapenna eldonis kelkajn el siaj brilaj paroladoj kaj prelegoj. Ni ilin

rekonas, se ni ilin aŭdis — persone mi kun speciala ĝojo tralegis ĝuste tiujn, kiujn mi aŭdis. Kelkaj el ili estas poste verkitaj laŭ notoj de la paroladinto, kaj ĉe ili oni povas konstati, ke vortoj aŭ frazoj, kiujn oni memoras pro iu speciala kaŭzo, elfalis — kio tamen ne suferigas la tuton.

Ĉi tiu libro ne estas nur elmonro de brila serio da paroladoj, kiuj meritas la presitan formon, sed — pro la situacio de la aŭtoro mem en la Esperanto-movado kaj pro la medioj en kiuj la paroladoj estas prezentitaj — ankaŭ kvazaŭ vivanta skizo pri la evoluo kaj historio de la moderna Esperanto-movado.

JHR.

### La Esperanta Konjugacio

Teo Jung: La Esperanta Konjugacio. Kun pli ol 1 000 ekzemploj plejparte Zamenhofaj, kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri la kunmetitaj verboformoj. Unua parto. 123 kvartformataj paĝoj, ĉ. 21 x 27 cm. Prezo por ambaŭ volumoj kune: egalvaloru de ned. gld. 13.50 (3.85 dolaroj, 54 steloj) plus 10 % por sendokostoj. Sola volumo ne mendebla. Eldonis: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Dum jaroj oni diskutis pri la uzo de la participoj. Povas ŝajni bagatela demando, sed ĝi efektive ne estas bagatela. Ĝi ja eĉ minacas fendi la esperantistaron pro ambaŭflanka malemo al kompromiso. Trovinte, ke kompromiso tamen estas la sola solvo — kvankam kompromiso ja ne estas solvo — Teo Jung, pioniro de nia movado, membro de la Akademio de Esperanto, verkis libron dupartan, kies kompleta titolo diras pli ol multaj vortoj: «La Esperanta konjugacio, kun pli ol 1 000 ekzemploj, plejparte Zamenhofaj, kaj kun abundaj klarigoj kaj konsiloj precipe pri la kunmetitaj verboformoj.»

En ĉi tiu recenzo ni volas neniel ripeti partojn de diskutoj aŭ argumentojn, sed ja tute senpasiĝe prezenti la libron de Jung. Necesas unue diri, ke ĝi estas tre facile legebla, kio tamen ne signifas, ke ĝi konvenas por komencanto, nek ke oni povas ĝin kvazaŭ duondorme tralegi: ĝi estas profunda studo, digna je streĉa atento; kaj ĝuste atenta pristudata ĝi donas plezuron al la leganto.

La libro de Jung pledas la saman sintenon al la participa demando kiel tiu de la Akademia Triopo Setälä, Stöp-Bowitz, Vilborg,

kaj volas montri, elirante de la 6-a regulo de la Zamenhofa Plena Gramatiko, kaj dokumentante per deklaroj de D-ro Zamenhof pri necesaj kvalitoj de Lingvo Internacia pri logiko ktp., ke oni vere povas utiligi la t.n. regolon de Beaufront, regulon, kiun ricevis sistampe de Beaufront de D-ro Zamenhof, por transpontigi la fendon inter la du malsamaj vidoj, do kiel taŭgan bazon por tre necesa interkonsento.

En ĉapitro pri la tempofazoj kaj tempostupoj la aŭtoro montras, ke konjugado ne estas malfacila, kaj la ampleksa ekzemplaro — kun komentarioj — cetere ordigita laŭ senriproĉe scienca maniero, estas pensiga legaĵo, kiu celas al la fina ĉapitro, kies esenco estas pledo por racia uzado de ĉiuj ses participoj, — t.e. ke ne unu aŭ du el ili havu signifon neparalelan kun tiu de la aliaj.

«La Esperanta Konjugacio» ne estas libro, kiun oni tuj glutas, sed ĝi estas tamen tre interesa. Mi deziras forte rekomendi ĝin al profunda pristudo por adeptoj de ambaŭ skoloj, ne malpleje ĉar ĝi estas verkita *con amore*, kun la ideala celo de pacigo, kaj verkita de homo, kiu dediĉis siajn fortojn kaj sian vivon al Esperanto.

Poste mi revenos al la dua parto.

JHR.

### Natura Nutrado

Ole Ramby: Natura Nutrado. Traduko el la dana de Betty Larsen. Monopola vendejo: SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20. Preso danaj kr. 1.70. 16 paĝa broŝuro.

Tiu broŝuro pledas enkondukon de «natura manĝaĵo», t.e. nekuiritaj fruktoj, legomoj, nuksoj ktp., kaj rifuzas ĉiun animalan nutraĵon. Kaj, kompreneble, dum la legado naskiĝas kontraŭaj pensoj. Jam la enkonduka frazo vekas en mi proteston: «Tio, kio estas etike rifuzita, ne povas esti science korekta. Tio, kio estas biologie ĝusta por la homo samtempe estos etike neatablebla.» Laŭ kiu etiko? Laŭ juda? kristana? aŭ budha? moderna humanetiko?

Ankaŭ la klarigo de etiko vekas demandon: «La etiko estas la propra, racia formulo de la vivo pri tio, kio estas aplikebla aŭ malaprobinda.» Mia propra, racia formulo de la vivo absolute ne malaprobos bonan bifstekon aŭ delikatan fiŝon. Do ĝi ne estas al mi science nekorekta?

## Norvega Kroniko

Red.: KARSTEN LANGSHOLT

### Kristiansands Esperantoklubb

8/12. Prez. Birger Reinertsen gvidis la konvenon. Li rakontis pri la agrabla jubilea kunveno en Oslo. Poste ni ricevis manĝon, kaj ni sidigis ĉe du tabloj. Ĉe la tablo nr. 1, Birger kaj sinjorino Hauge interparoladis, kaj sinjorino Hauge disdonis bonan spiritan kristnask-vinon. La individuoj ĉe la tablo nr. 2, ŝtelaŭskultis, kaj kaptis kelkajn spiritajn vingutojn de la granda fontano. Poste Birger gvidis muzikan diven-konkurson.

«MARA VENTO», Haugesund, okazigis sian unuan kunvenon en 1967 la 12/1.

S-ano Hendry Hermansen, kiu kelkajn jarojn laboris kiel horloĝisto en Ameriko, prezentis tre interesan, instruajn kaj kolorriĉan lumbilo-programon el Usono kaj Meksiko. Oni dankis lin per multa aplaŭdo.

La novan labor-sezaron enkondukis tre plaĉa kaj sukcesa krab-festeto en somer-domo ĉe-fjorda. Aranĝis la studrondo kiu estis invitinta ankaŭ la estraranojn.

La vizito de la hinda s-ano d-ro Aŝvinikumar' fine de septembro estis tre ŝatata

Ankaŭ la hepata fiŝoleo laŭ la pamfleto estas «sciencie malkorekta», ĉar la fiŝoj «gardas sin kaj fuĝas rapidege se ili sentas nian senperan proksimon» kaj la fiŝkaptado estas «ofendo al la homa digno.»

Ankoraŭ unu demando: En Danujo estas (laŭ 1948-jara libro) 2 987 000 bovoj, 1 823 000 porkoj, 83 000 ŝafoj, 130 000 kunikloj krom multaj aliaj bestoj. Se oni ne plu rajtas uzi tiujn por nutro, oni devas aŭ mortigi ilin — kaj tion oni ja ne rajtas laŭ la homa digno — aŭ liberigi ilin. Ĉu ne tio gvidos al «hindaj» cirkonstancoj, t.e. ke la bestoj formanĝos ĉion, per kio la homo devas vivi, kaj ke ili ĉie vagas, ĝis oni por ili konstruos maljunulejojn?

Do — la broŝuro vekis min al protesto, kio estas unu flanko de pensado. Eble ĝi vekos vin al samopinio. Almenaŭ ĝi povas veki al penso.

Haro.

okazaĵo, kiu kunvenigis pli ol kutime multajn geklubanojn. Lian interesan paroladon pri sia hejmlando la kunvenantoj aŭskultis kun atento granda, kaj poste la parolinto devis respondi al demandoj pri aferoj hindaj. Okaze de la vizito de d-ro Aŝvinikumar' aperis gazet-intervjuo kun foto.

La oktobra klubkunveno enhavis kongres-programon kaj estis relative multnombro vizitata. Klubano O. J. Rønnevig prezentis tre bel-koloran kaj interesan filmon pri la aŭto-vojaĝo al Hungarujo, pri la universala kongreso kaj pri posta vizito en Jugoslavio. Aplauĉo meritita al la programulo. Aldone al la filmo estis prezentitaj plaĉaj kolorlumbildoj kiujn faris dum la vojaĉo T. Reisæter, Odda.

La programo de la *kunveno novembro* estis dediĉita al la kongres-lando 1967 - ISRAELO. Per instruaj kaj plaĉaj kolorlumbildoj ni ekkonatiĝis al diversaj flankoj de tiu unika lando; popolo, pejzaĝoj, vivo kaj laboro —

La *decembra kunveno* okazis en festa kadro. Bele ornamitaj salono kaj festotabloj kreis agrablan etoson kaj ni bone ĝuis la kuneston ĝis la noktaj horoj.

S-ano Sigmund Blikshavn ĝojigis la ĉeestantojn per tre belaj kaj plaĉ-koloraj lumbildoj faritaj lastsomre dum vojaĝo en Francujo kaj partopreno en internacia popol-danca festivalo en la franca urbeto Montre-

### Helsingör

La internaciaj feriaz Esp-kursoj okazos 23.—30. de julio en La internacia Altlernejo (tute modernigita) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,  
Ingemannsvej 9,  
Abybøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaz Esp-kursoj okazos en la alternejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 15.—21. de okt. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

## Norvega Esperantista Fervoĵista Asocio (N.E.F.A)

### Jarraporto 1966—1967

#### RESUMO

La plej grava tasko de NEFA dum la jaro, estis varbkampanjo inter la Norvega Fervoĵistaro, por veki intereson por Esperanto, tiel ke ili eklernu la lingvon.

La asocio ellaboris planojn pri informkunveno al kiu ĉiu fervoĵisto kun familianoj, kiuj emas fariĝi esperantistoj, invitiĝis.

En tiu informkunveno oni volas prelegi pri Esperanto kaj pri la movado ĝenerale, kaj pri IFEF kaj ĝia laboro, cetere oni volas iom instrui la lingvon, por stimuli la ĉeestantojn al daŭriga studado post la kunveno. Aŭtune 1966, Per Johan Krogstie partoprenis en seminario por Esperantoinstruistoj en Danlando, laŭ la metodo de Friis, — por ke li poste, dum la informkunveno povu doni la komencan instruadon.

NEFA invitas al informkunveno en Budor Turistkabano en Løten, al semajnfina aran-

jeau proksime al la Pireneoj. Sekvis la programon kora aplaŭdo!

La prez. memoriĝis pri la Tago de la Homaj rajtoj kaj laŭtlegis kelkajn partojn el la deklario eldonita en Esperanto. Kunlige kun tio li menciis ankaŭ la tagon de la Esperanto libro kaj atentigis pri aranĝita libro-stando en la salono.

Estis sukcesa ellotado, pianmuziko per O. Lokna — kaj dancado.

Ref.

#### JARKUNVENOJ

La Esperantoklubo de Bergen.

26/1 1967. Laŭ elekto la estraro en la nova jaro estas:

Prezidanto: Elsa Njøten  
Vicprezidanto: Leonora Sivertsen  
Sekretario: Kristian Sivertsen  
Kasistino: Nelly Bjørge Nilsen  
Estrarano: Åshild Birkenes.

ĝado la 5an kaj 6an de novembro, sed pro tro malmultaj gepartoprenantoj, ĝi ne povis okazi.

Dum la 18a kongreso de IFEF en Utrecht, Odd Kolbrek kaj Erling Rygge reprezentis NEFA.

Dum la kongreso la norvega komitatano voĉdonis por la propono ke IFEF aliĝu al UEA kiel faka organizaĵo.

Ĉar IFEF eldonis novajn statutojn, oni ankaŭ trovis ke estas necese kun ŝanĝoj de la NEFA-statutoj.

Rimarkinda ŝanĝo estas la ŝanĝo de la asocia nomo, nun la nomo fariĝis: Norvega Esperantista Fervoĵista Asocio — anstataŭ: Norvega Esperanta Fervoĵista Asocio.

La leĝŝanĝigoj akceptiĝis de la jarkunveno de NEFA en Lillestrøm la 19an de februaro 1967.

LA MEMBRONOMBRO daŭre estas proksimume 60 personoj.

LA RILATOJ KUN NORVEGA ŜTATA FERVOJO, SINDIKATOJ KAJ FERVOJISTAJ LIBERTEMPASOCIOJ daŭre estas la plej bonaj. Kiel antaŭe, NEFA ricevis ekonomian helpon de kaj Norvega Ŝtata Fervojo, kaj de Norvega Fervoĵista Sindikato.

Praktike helpis ankaŭ kaj la Fervojo, la sindikatoj kaj la libertempaj asocioj. La Fervojo donis al nia varbkampanjo propagandofaŝiojn, kaj per la helpo de la Fervojo, la afiŝoj pendigis en ĉiu deĵorejo tra la tuta lando.

Cetere la Fervojo eldonis 24-paĝan varb-broŝuron en stoko de 5 000 ekzemplero.

Por helpi NEFA en la varbkampanjo, en sindikataj kaj libertempasociaj gazetoj oferis al NEFA senpagajn anoncojn kaj skribis multe pri Esperanto.

En ĉambro en Norvega Fervoĵmuzeo en Hamar, pendas la emblemo de IFEF en grandega formato. Norvega Ŝtata Fervojo estas inter la entreprenoj kiuj anoncas en la jarlibro de UEA per tutpaĝo anonco.

LA RILATO AL UEA KAJ AL NORVEGA ESPERANTISTA LIGO ankaŭ estas



# Korespondu!

tre bona. Multaj NEFA-anoj partoprenis tre aktive en la subskribkolektado por Esperanto. Cetere NEFA pagas por fakdelegito de UEA en Oslo. De 1967 NEFA eldonas fervojistan paĝon en la organo de Norvega Esperantista Ligo: Norvega Esperantisto.

## LA FAKAJ LABOROJ DE NEFA.

La asocio helpis la Fervojon per revizado de la antaŭe eldonita turistbroŝuro: «Vojaĝu kun ĝojo per Norvega Ŝtata Fervojo», ĝi nun aperis en modernigita formo.

La laboro kun fakvortaro, laŭ modelo de la germana eldono, progresas.

## ÅRSMØTET 1967

ble arrangert søndag 19. februar i Carlton Hotell i Lillestrøm.

Valg: Formann: Per Krogstie (gjenv.) Nestformann: John Moe (gjenv.) Kasserer: Kjell Karlsen (gjenv.) Sekretær: Odd Kolbrek (gjenv.) Styremedlemmer: Øivind Lund (ny) og Gunnar Flenvang (gjenv.) Vararenn til styret: Erling Rygge og Olaf Nyberg.

Formannen, Per Johan Krogstie, fortsetter som NEFA's komitémedlem til IFEF, og nestformannen, John Moe, fungerer fortsatt som fagrepresentant for jernbanespørsmål — fakdelegito de UEA, i Oslo.

Revisorer: Brynjulf Andresen (ny) og Johan Kleven (gjenv.)

Til den nye funksjon som redaktør av NEFA-siden i Norvega Esperantisto, ble sekretæren, Odd Kolbrek valgt.

Bibliotekarer: Kjell Karlsen og Hans M. Berglie.

NEFA's årsmøte valgte disse som representanter i følgende jernbanedistrikter: Oslo distrikt: Lok.fyrb. Sverre Hjelseng. Hamar distrikt: O.kond. Kåre Bye. Trondheim distrikt: Forrådsbetj. Erling P. Næss. Drammen distrikt: Dreier John Moe. Kristiansand distrikt: Pensj.stm. Ragnvald Horrisland. Stavanger distrikt: St.form. Odd Russdal Hamre. Bergen distrikt: Ledningsformann Wilfred Hortmann.

Som NEFA's delegerte til den 19. IFEF-kongress i Fulda i Vest-Tyskland i tiden 6.—12. 5. 1967, valgtes Per Johan Krogstie og Per Engen.

Mi deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj kaj interŝanĝi bildkartojn k.t.p. Walter Täubrich, 7024 Leipzig, Baunackstr. 10, D.D.R.

21-jara studento deziras korespondi kun norvegaj geesperantistoj. Kazimierz Kania, ul. Kawioru 20, Kraków, Polujo.

LETERNONATON en majo, okaze de kursfino organizas Esperanta rondeto en Ŝumperk. Certa respondo. Ĉiu ricevoe broŝuron pri montaro Jeseník kaj bildkarton. Skribu multnombre al Věra Dufková, Lenínova 5, Ŝumperk, Ĉeĥoslovakio.

Estus granda ĝojo se iu volus korespondi kun mi. Mi kolektas bild-poŝtkartojn. Rudolf Seifert, Amselsteg 4, 8054 Dresden, D.D.R.

Ĉu iu volus korespondi kun niaj gekomencantoj? Robert Kunert, oficisto, 125 Dolní erníná, Ústí nad Orlicí, Ĉeĥoslovakujo.

## NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

## ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.32

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

## Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

## La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri uĝaj sendaĵoj.

Telefona: 54 727